Novjorka Prismo

Numero 128 Novembro 2003

*The Esperanto Society of New York invites you to learn about ESPERANTO, the International Language, at its annual OPEN HOUSE!*

DATE: Friday, November 21, 2003, 6:30-9:00 pm

PLACE: United Federation of Teachers, 50 Broadway, A - 2nd floor (between Bowling Green and Exchange Place), NYC

PROGRAM: 6:30 – Refreshments

7:00 – New York esperantists will present short talks (in English) about Esperanto, its origins, and how it is used today. The program also includes a short lesson, songs in Esperanto, and a videotape about the International Language. Everyone is welcome! Bring a friend! ★

## Protokolo de la kunveno de la 17-a de oktobro 2003

De 6:30 ptm ĝis 7:22 ptm, la grupo estis malgranda – malpli ol dek ĉeestantoj. Tial, la ĉeestantoj dum tiu tempo havis neformalan, neplanitan konversacion, ĉefe pri la uzo de la komputilo kaj la roma alfabeto por skribi en la ĉina.

Je 7:22 ptm, Tomaso ECCARDT oficiale malfermis la kunvenon, li faris anoncojn kaj pri la Malfermita Domo, kiu okazos venontmonate, kaj pri la Kandidatiga Komitato.

Ĉeestis 16 personoj, inter ili du gastoj. La unua gasto estis Asghar SAJADIAN el Vieno, Aŭstrio, nun konata de multaj membroj en nia Societo. La dua gasto estis Ghuzal BADAMSHINA, muzikologo el Seattle, Washington, kiu ĉeestis la unuan fojon.

Rochelle F. GROSSMAN diris, ke la ĝusta literumado de la familia nomo de Irene estas GINSBERG. Poste, la protokolo de la antaŭa formala kunveno estis akceptata.

Rochelle montris al la grupo du artikolojn pri Esperanto. La unua artikolo estis de la ĵurnalo *St. Paul Pioneer Press*. Tiu artikolo menciis la nomojn de multaj esperantistoj konataj al ŝi. La dua artikolo estis de la ĵurnalo *American Philatelist*. Tiu artikolo temis pri la uzo de Esperanto je poŝtmarkoj.

Alex KARKOVSKY parolis pri siaj spertoj dum la pasinta tri-taga semajnfino ĉe la Internacia Semajnfino Esperantista en Okemo, Vermont. Multaj membroj de nia Societo vojaĝis tien. Okazis klasoj, prelegoj, komunaj manĝoj, kaj aliaj distraj aferoj.

Je 7:40 ptm, Nijl BLONSTEIN alvenis kun 34 el la libroj donitaj al la klubo de Julius BALBIN.

Je 7:45 ptm, Tomaso parolis tre mallonge pri religio, la temo de nia diskuta rondo.

Je 7:48 ptm, oni sugestis, ke la ĉeestantoj iru al la tablo en la antaŭa parto de la ĉambro, por trarigardi la aŭkcie vendotajn librojn.





Je 8:00 ptm, Tomaso komencis la aŭkcion de la libroj, kaj Ghuzal helpis lin. Venditaj estis ĉefe vortaroj, libroj de poezio, libroj de fremdlingvaj frazoj, kaj lingvistikaj libroj.

Je 8:40 ptm, tuj post la aŭkcio, Tomaso oficiale fermis la kunvenon. Ni ne revenis al la diskuta rondo pri religio. Tuj poste, pluraj ĉeestantoj iris al Café World por manĝi kaj trinki. ★

*Protokolis: Stuart GREEN*



*Oni trarigardas librojn (supre) kaj babiladis ĉe Cafe World (sube).*


## Okemo – la 10-a Internacia Semajnfino Esperantista

La 10-a sinsekva Internacia Semajnfino Esperantista (ISE) estis sukcesoplena. Ni 7 novjorkanoj (Maki Sano, Tomoko kaj Alfredo Petrov, Alex Karkovsky, Nijl Blonstein, Andy Zhang, Susan Kohn, kaj mi) ĝuis la plej belan veteron rememoreblan kaj buntan programaron, inkluzive la kutiman kulturan vesperon kaj kune faritan bankedon. Rimarkinde abundis junuloj inter la 60 renkontiĝintoj.



Mi gvidis la bazan kurson por 10 gekomencantoj kaj prelegis pri *Ŝlosilo al 'La Postdomo' kaj ĝia fono* al pli ol 30 aŭskultantoj en la ĉefa salono. Ili ride ĝuis mian prezentadon de preskaŭ ĉiuj moknomoj kaj esprimoj el la en Gotenburgo furora romaneto de István Ertl kun klarigo pri la krizo en la Centra oficejo de U. E. A.

Supre estas de Maki Sano farita foto de mi kaj Marc Bavant, gasto el Eŭropo kaj gvidanto de la meznivela lingva kurso kaj ankaŭ preleginto. Mi tenas danke donacitan libreton de Zdravka Metz, organizantino de ISE kun la edzo Normando Fleury. Mi ankaŭ havas Maki-an foton de mi kaj Normando, videblan laŭ peto. ★



*– Arnold VICTOR*

## Bahaa Festo

Sabaton, la 25-an de oktobro 2003, mi ĉeestis la 16-an ĉiu-jaran Internacian Vespermanĝon Celebre de la Tago de la Unuiĝintaj Nacioj okazigita de la Longinsula Unueca Komitato de la Bahaa Raso. Mi eksciis pri tiu-ĉi evento de Cynthia RICHARDS, bahaanino kaj esperantistino, kiu loĝas en Longinsulo. La membroj kunportis la manĝaĵon.

Je la sepa horo ptm, je la komenco de la programo, estis la diverslingva deklamado de preĝoj por unueco. Cynthia laŭtlegis preĝon en Esperanto el libro pruntita de Jim HOPKINS, ankaŭ bahaano kaj esperantisto, kiu deklamis preĝon en la franca. Je la fino de la programo, Jim dancis mezorientan kabaredan dancadon kun kvar virinoj.



Aliaj spektakloj estis: gitarludo kaj kantado en la rusa, ŝnursaltado en duobla nederlanda stilo, farado de rimarkoj pri la Unuiĝintaj Nacioj, kaj la ludo de tradicia ĉina muziko per timpano. Estis informotabloj pri Unuiĝintaj Nacioj kaj pri la bahaa kredo. Estis broŝuroj en la angla kaj la hispana lingvoj. Parto de la kredo de la bahaanoj estas, ke la uzo de tut-monda lingvo helpos je la atingo de monda paco.

La evento okazas ĉiu-jare, je la sabato plej proksime al la 25-a de oktobro, la Tago de la Unuiĝintaj Nacioj, ĉe la Preĝejo de Sankta Petro, Montauk Highway, West Bay Shore, L.I. ★

*Raportis: Stuart GREEN*

## Societa Kalendaro

Venu al niaj venontaj renkontiĝoj! Metu tiujn datojn en vian kalendaron.

**Novembro 2003 — 21**

**ESNY OPEN HOUSE**
**Come learn about Esperanto!**
*Friday, 6:30 p.m. at UFT, 50 Broadway*

**Decembro — 7**

**Tagmanĝo**
*Dimanĉon, 1:00 ptm ĉe IBM Plaza*
(Limdato por kontribuaĵoj por *Prismo* 129)

**19**

**ESNY Zamenhofa Festo**
*Vendredon, 6:30 ptm ĉe UFT*

United Federation of Teachers (UFT)
50 Broadway, A - 2nd Floor, NYC
(between Bowling Green and Exchange Place)

"IBM" Building Atrium (antaŭa nomo)
590 Madison Avenue (56th Street) NYC
Street level, in the Atrium

## Unuetaĝa Usono



Saluton! Al mi plaĉis via E-paĝo, tial mi sciigas vin pri tio, ke mi tradukis en Esperanton libron *Unuetaĝa Usono*. Ĝin verkis du mondfame konataj rusaj humuristoj post kvarmonata vojaĝo al via bela lando en 1935. En Usono oni ĝin eldonis sub titolo *Little Golden America*. Ĝi troveblas en *<www.vladimir-okc.hotbox.ru>* kaj, mi esperas, ĝi sendube plezurigis vin dum legado, des pli, ke Nov-Jorko estas ofte menciita tie. Min interesas viaj impresoj pri ĝi. ★

*– Ĉion plej bonan sincere deziras al vi, Vladimir OKC*

## IBM Plaza




La 2-an de novembro pli malpli dek novjorkaj esperantistoj renkontiĝis ĉe IBM Plaza por babili. Inter aliaj aferoj, oni diskutis la venontan Malfermitan Domon de nia klubo. ★

*– Tom ECCARDT*

**ESPERANTO-SOCIETO DE NOVJORKO**
c/o UEA, 777 UN Plaza, NY, NY 10017 (212) 687-7041
http://www.geocities.com/esperanto_nyc

| Prezidanto | Koresponda Sekretariino | Protokolisto |
|---|---|---|
| Thomas Eccardt | Rochelle F. Grossman | Stuart Green |
| (212) 477-6516 | (718) 457-1490 | (631) 751-5683 |
| **Vicprezidanto** | **Kasistino** | **Program-Direktoro** |
| Thomas Leong | Sofiya Soskina | Neil Blonstein |
| (718) 981-4252 | (914) 738-6084 | (212) 663-2020 |

**Novjorka Prismo**
Numero 128 – Novembro 2003
ISSN: 1059-5627
http://members.aol.com/novjorka/prismo

| Redaktoro | Subredaktoroj | Desegnistino |
|---|---|---|
| Jim Medrano | Thomas Eccardt | Mary Pulley |
| (212) 982-5029 | Nancee Medrano | |

Sendu kontribuaĵojn al:
Jim Medrano, 400 East 20th Street #1B, New York, NY 10009-8103
e-poŝto: medrano@mac.com
© 2003 Esperanto Society of New York